

Ernst Anschütz,
Abio ho

tradukita de Richard Schulz

Abio, ho! Abio, ho!
Vi estas tre fidela.
Vi estas verda en somer',
En vintro kaj en primaver'.
Abio, ho! Abio, ho!
Vi arbo tre fidela.

Abio, ho! Abio, ho!
Vi multe al mi plachas!
Vi estas ja Kristnaska ghoj',
Vi arbo apud negha voj'!
Abio, ho! Abio, ho!
Vi multe al mi plachas!

Abio, ho! Abio, ho!
Min vi verdul' instruas:
Ke konstantec', ke la esper'
Konsolas nin en la mizer'.
Abio, ho! Abio, ho!
Min vi verdul' instruas.

...

Ernst Anschütz,
O Tannenbaum

O Tannenbaum, o Tannenbaum,
Wie treu sind deine Blätter!
Du grünst nicht nur zur Sommerzeit,
Nein auch im Winter, wenn es schneit.
O Tannenbaum o Tannenbaum,
Wie treu sind deine Blätter.

O Tannenbaum, o Tannenbaum!
Du kannst mir sehr gefallen!
Wie oft hat nicht zur Weihnachtszeit
Ein Baum von dir mich hoch erfreut!
O Tannenbaum, o Tannenbaum,
Du kannst mir sehr gefallen!

O Tannenbaum, o Tannenbaum!
Dein Kleid will mich was lehren:
Die Hoffnung und Beständigkeit
Gibt Trost und Kraft zu jeder Zeit.
O Tannenbaum, o Tannenbaum!
Das will dein Kleid mich lehren.

...

Ernst Anschütz,
Abio vi

tradukita de Paul Gottfried Christaller

Abio vi, abio vi,
kun foliar fidela!
Vi verdas ne nur en somer',
sed eĉ dum vintra neĝa ter'.²
Abio vi, abio vi,
kun foliar fidela!

Abio vi, abio vi,
Al mi tre multe plaĉas.
Ho, kiom ofte ĝojis mi
en la kristnaska bril' be vi!
Abio vi, abio vi,
Al mi tre multe plaĉas.

Abio vi, abio vi,
instruon donas bonan:
Espero kaj la konstantec'
konservas forton de junec'.
Abio vi, abio vi,
instruon donas bonan.

...

²aŭ:

sed eĉ dum vintra neĝ-veter'.

Tiun version de tiu ĉi linio mi, Manfred Retzlaff, iam aŭdis.

*Traduko de la Germana poemo "O Tannenbaum" de ERNST ANSCHÜTZ (*1780-10-28 – †1861-12-18) en Esperanton de RICHARD SCHULZ (Rikardo Ŝulco, *1906-07-12 – †1997-09-26).*

Arg-593-1193 (2013-02-26 15:10:12)

Tiu chi traduko aperis en 1982/12 en la n-ro 42 de la Vestfaliaj Flugfolioj eldonitaj de Rikardo Ŝulco (Richard Schulz). Tie estas indikitaj ankaŭ la muzik-notoj. Pri Richard Schulz vidu la vikipedian retejon http://de.wikipedia.org/wiki/Richard_Schulz.

*Verkinto de tiu ĉi Germana poemo estas ERNST ANSCHÜTZ (*1780-10-28 – †1861-12-18).*

Arg-593-1192 (2012-12-13 18:19:42)

Pri la verkinto Ernst Anschütz vidu ankaŭ la vikipediejon http://de.wikipedia.org/wiki/Ernst_Ansch%C3%BCtz. Tie estas indikitaj ankaŭ la muziknotoj. La melodie estas aŭdebla en <http://www.youtube.com/watch?v=TlaRq509zKY>. La verkinto de la melodio ne estas konata. La muziknotoj troviĝas ekzemple en http://www.lieder-archiv.de/o_tannenbaum-notenblatt_200078.html.

*Traduko de la Germana poemo "O Tannenbaum" de ERNST ANSCHÜTZ (*1780-10-28 – †1861-12-18) en Esperanton de PAUL GOTTFRIED CHRISTALLER (*1860-08-21 – †1950-12-31).*

Arg-593-1455 (2012-12-13 18:37:04)

Tiu ĉi esperantigo de la kanto troviĝas en la retejo http://kantaro.ikso.net/das_deutsche_lied_in_esperanto sub http://kantaro.ikso.net/abio_vi. Ĝi aperis unuafoje en la kant-libro SSas e